

XXX ORDINARA DIMANĈO - 25a de oktobro 2009

RABENO MIA KE MI RICEVU DENOVE MIAN VIDPOVON – Komentario al la Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

Mk. 10, 46,52

En tiu tempo dum ili venis al Jeriĥo; kaj kiam li foriris el Jeriĥo kun siaj disĉiploj kaj granda homamaso, la filo de Timeo, Bartimeo, blinda almozulo, sidis apud la vojo. Kaj aŭdinte, ke ĉeestas Jesuo, la Nazaretano, li ekkriis, kaj diris: Jesuo, filo de David, kompatu min. kaj multaj admonis lin, ke li silentu; sed li des pli forte kriis: Ho Filo de David, kompatu min!

Kaj Jesuo haltis, kaj diris: Alvoku lin. Kaj oni alvokis la blindulon, dirante al li: Kuraĝu; leviĝu, li vin alvokas. Kaj forĵetis sian veston, kaj eksaltis kaj venis al Jesuo

Kaj Jesuo responde al li diris: Kion vi volas, ke mi faru al vi? Kaj la blindulo diris al li: Rabeno mia, ke mi denove ricevu vidpovon. Kaj Jesuo diris al li: Iru; via fido vin savis. Kaj tuj li denove ricevis vidpovon, kaj sekvis lin sur la vojo.

Tiu ĉi epizodo estas strikte ligita al la antaŭa, la peto de Jakobo kaj Johano havi la honorlokojn apud Jesuo en la momento de Lia triumfo. Do oni devas ĝin legi el tiu vidpunkto.

Ni vidas Jesuon, : “ili venis al Jeriĥo”. Jeriĥo estas la lasta urbo antaŭ la promesita lando kiun Joŝija transiris kun siaj sekvantoj, kaj “kiam li foriris”, la Evangeliisto uzas verbon uzita por la eliro, do temas pri la eliro la lasta etapo por Jesuo, tie estas prezentita stranga rolulo:” la filo de Timeo, Bartimeo”. Antaŭe li estas prezentita per sia greka nomo, filo de Timeo kaj poste per la sama nomo en la aramea lingvo.

Kutime Sankta Marko, kiam li devis prezenti aramean vorton, unue li ĝin prezentis en tiu ĉi lingvo kaj poste en la greka traduko. Ekzemple, kiam li diras “Talità kum”, kiu signifas “leviĝu knabino”, aŭ kiam li diras “Effatà”, kiu signifas “malfermiĝu vi”, ĉi tie kontraŭe troviĝas unue la grekan terminon, “la filo de Timeo”, Timeo signifas “la honoro, la ŝatata”, kaj poste troviĝas la aramea egala vorto.

Tio okazas ĉar la evangeliisto volas kompreniĝi al ni “Atentu! Ĉar trans la historia realeco tiu estas rolanto ege simbola per kiu mi volas bildigi por vi la disĉiplojn – Jakobo kaj Johano- kiuj kvankam Jesuo jam estis dirinta ke Li iris morti, ili havas orelojn sed tion ne aŭdas, ili havas okulojn, sed tion ili ne vidas kaj ili nur pripensas propran triumfon”.

Tiu estas la filo de Timeo. Estas strange ke li estas prezentita kiel la filo de la honoro, sed oni ne diras lian nomon, li estas sennomulo.

“Kiu estis blinda”. Jen kial li estis blinda, kiel diris Jesuo riproĉinte siajn disĉiplojn, “ili havas okulojn sed ili ne vidas”. La kialon de la blindeco malkaŝas al ni la evangeliisto, :”li sidis apud la vojo”.

“Apud la vojo”, en la 4a ĉapitro de tiu ĉi Evangelio, ĉe la versego 15a Jesuo klarigis ke:” Jen do tiuj, kiuj estas apud la vojo, kie estas semata la vorto; kaj kiam ili aŭdis, tuj venas Satano, kaj forprenas la vorton, en ili semitan. “ Satano estas la bildigo de la povo. La disĉiploj estas bildigitaj de tiu naciisma ideologio pri la povo, pro tio ili ne komprenas la vorton de la Sinjoro.

“Aŭdinte, ke ĉeestas Jesuo, la Nazaretano, “- Nazareto estas la urbo de Galileo kie sin ĉirkaŭbaris la zelotoj, do, diri “Jesuo la Nazaretano” signifis diri “la batalema, la revolucia” – “, li ekkriis, kaj diris: Jesuo, filo de David”!

Li estas blinda, Jesuo estas la Filo de Dio, ne la Filo de David. “Filo”, en tiu kulturo signifis tiu kiu similis la patron en sia sinteno; “Filo de David” rilatis la atendadon de la Mesio, Mesio pova je forto kaj je violento, kiel estis David, la reĝo kiu sukcesis rekunigi la dekdu tribojn kaj doni al ili ĉefurbon, t.e. Jeruzalemo, sed ĉion faris perforte.

Jesuo ne estas la “Filo de David, Jesuo estas la Filo de Dio, Jesuo ne forprenas ies vivon, sed Li ofertas la Sian. Jen la kialo de la blindeco; la blindulo sin turnas al Jesuo nomante Lin “Filo de David”. Do, “Filo de David, Jesuo, kompatu min!” Per tiu ĉi frazo li ne estas vokinta reakiri la vidon. “Kompatu min”, temas pri la popolamaso kiu vidas en la Filo de David la solvon al sia suferado, al la superregado. Okazas kiel, ĉe la eniro en Jeruzalemo Jesuo estas akceptita per “Hosana al Filo de David!”

Nu, kvankam multaj admonis lin, ke li silentu, li des pli forte kriis: Ho Filo de David, kompatu min!” Li petas de Jesuo ke Li restaŭru la monarkion de la reĝo David. “Jesuo haltis, kaj diris: “Alvoku lin!”

Li alvokas lin, kiel Li alvokas la disĉiplojn kiuj ĉiam estas malproksimaj de Li, ili akompanas Lin, sed ili ne Lin sekvas.

Ili forestas de Li ĉar ili estas viktimoj de tiu religia ideologio.

Oni. alvokas lin kaj Jen komenciĝas la konvertiĝo de la disĉiplo. “ Li forĵetis sian veston...”- la vesto indikas la homon, do la rompon kun la pasinteco mem, ĝi montras la rompon kun la propra ideologio – finfine estas li kiu iras al Jesuo, ne estas Jesuo kiu iras renkonten al la disĉiplo, sed estas la disĉiplo kiu devas iri al Jesuo kaj sekvi Lin.

“Tiam Jesuo diris al li”- kaj Jesuo sin turnas al tiu ĉi blindulo per la tute samaj vortoj per kiuj Li sin turnis jam al Jakobo kaj Johano pro ilia peto – “Kion vi volas, ke mi faru al vi?” Do, la evangeliisto, pere de tiu literatura skemo, volas komprenigi al ni ke en la rakonto pri tiu blindulo troviĝas la klarigo pri la peto de Jakobo kaj Johano.

Kaj la blindulo responde diris al li: “Rabeno mia”-Li ne plu nomiĝas Lin Filo de David. “Rabeno” estis respektoplena termino kiun oni uzis por nomi Dion; la majstroj de Izraelo estis nomataj “Rabbi”, sed Dion oni nomis “Rabeno”, do la disĉiplo komencas kompreni.

“Ke mi denove ricevu vidpovon! “ Do li antaŭe vidis, li fariĝis blinda, li ne naskiĝis blinda. Estis la religia, naciista ideologio pri tiu triumfo de Izraelo kaj de la Mesio kiu blindigis lin.

“Kaj Jesuo diris al li:” Iru; via fido vin savis”, kiam la disĉiplo tion komprenas li eniras la liberigon. “Kaj tuj li denove ricevis vidpovon”, do li denove vidis kiel antaŭ ol esti blindigita de la ideologio, “kaj sekvis lin apud la vojo.” Ĉi tie la traduko estas “sur la vojo”, sed ne estas tiel. “Sur la vojo” havas negativan signifon, ĝi prezentas la semon kiu estis forprenita de la birdoj- nome, de Satano

mem – sed, pli ĝuste estas “en la vojo”, tio estas la vojo de Jesuo, finfine la disĉiplo sekvas la Sinjoron.